



**ROK XXIV.**  
**SIERPIEN-WRZESIEN 1930.**  
N-r. 8-9.



**JARO XXIV.**  
**AUGUSTO-SEPTEMBRO 1930.**  
N-o 8-9.

**EL POLLANDAJ VIDINDAJOJ.**



Panoramo de Łódź el turq de la katedrala preĝejo.

**ESPERANTYSTA POLSKI**  
**POLA ESPERANTISTO**

  
WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &  
EL.DONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTOJ  
TADEUSZ HODAKOWSKI

---

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towa-  
rzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jed-  
nym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperan-  
tistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

---

**WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!**

**Atentu!** Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado“.

Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—

Enpaĝu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

---

La junaj gekomencantoj deziras interkorespondadi kun gekomencan-  
toj de l'tuta mondo.

P. Roman, F. Sielawa, M. Przewodowski.

Skribu al instruanto: S. Roman, Mława. Dzierżgowska 8. Polujo.

---

**TREŚĆ — ENHAVO:**

**IV POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO. ŁÓDŹ — URBO DE  
LABORO. ESPERANTO EN ŁÓDŹ (KOMP. ILO). I. LEJZERO-  
WICZ: ŁÓDŹ (VERSAJO). M. DEMBIŃSKI: ŁÓDŹ. O. B.: 22-A UNI-  
VERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN OXFORD. POLLAN-  
DA KRONIKO. KONKURSO EN VERKADO DE PROPAGANDI-  
LOJ. KOMUNIKOJ DE P. E. D. AVERTO! ALVOKO AL ĈIUJ RE-  
DAKCIOJ DE ESP.-REVUOJ. RICEVITAJ GAZETOJ.**

---



# POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO  
KAJ EKSTERLANDE.

## ESPERANTYSTA POLSKI.

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE  
I ZAGRANICĄ.

ROK XXIV JARO

KRAKÓW

SIERPIEŃ 1930  
WRZESIEŃ      AUGUSTO  
                    SEPTEMBRO

Nr 8 — 9 N-o

### IV POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO

Łódź, la 20. kaj 21. IX. 1930.

(adreso de Loka Komitato: p. a. s-o J. Glicensztejn,  
Łódź, Zachodnia 54).

**AKCEPTEJO:** vendrede, la 19-an de septembro ĝis la 24 horo: Lodza Esperanto Societo, Południowa 3.

Sabate kaj dimanĉe, t. e. dum la kongresaj tagoj: Rada Miejska, Pomorska 16.

**FAKKUNSIDOJ:** ĝis nun estas anoncitaj fakaj kunvenoj de „Laboro“ kaj U. E. A. — Precizaj horoj estos troveblaj sur specialaj mur-tabuloj en la akceptejo.

**VIZITADO** tra la urbo: okazos granda ekskurso al la fabrikoj de „WIDZEWSKA MANUFAKTURA“, kies direkcio salutos la kongresanaron. Ankaŭ aliaj ekskursoj okazos.

**KONGRESA BALO:** Ĝi okazos ne en Manteuffel, kiel komence projektite, sed en la belaj salonoj de „Picadilly“.

**ĜENERALAJ VIVKONDIĈOJ:** Ni atentigas, ke la manĝado estas en Łódź malkara (ĉ. 4 zł. tage). En la akceptejo la kongresanoj estos informataj tiurilate plej detale.

**LOĜADO.** Ni rezervis ĉambrojn en hoteloj po 5 zł. kaj 6.25 zł., en t. n. meblitaj ĉambroj po 2.50 kaj 3 zł., kaj ankaŭ certan nombron da senpagaj litoj en komuna loĝejo, kiun afable disponigis al ni la urba administracio. Ni tamen atentigas, ke ni ne garantias pri loĝado por personoj, kiuj malfrue aliĝos.

**ALIĜOJ:** Aliĝoj el ĉiuj partoj de la lando pli kaj pli multnombre alvenadas. Kiu ankoraŭ ne aliĝis, faru tion tuj por ne laborŝarĝi nin en la lastaj tagoj. La kongreso promesas esti tre sukcesa kaj interesa. La kotizon zł. 5.— bonvolu alsendi per poŝtmandato laŭ supre montrita adreso de L. K.

**GARANTIA FONDO.** Plue pagis: Dro J. Kostecki kaj Dro W. Róbin (Warszawa) po 15 zł.

**RADIO-DISAŬDIGO.** La Solena Malfermo, sabate la 20. IX. je 17 horo **versajne** estos transmitata per la Lodza Radio-stacio. Sa-

mideanoj, kiuj ne povos ĉeesti nian kongreson, bonvolu je montrita horo „kapti“ la Lodzan ondon kaj okaze de bona rezulto sendi dankleteron al „Polskie Radjo — Łódź“.

**AKCEPTO EN STACIDOMO.** Samideanoj, kiuj antaŭe letere petos tion, estos akceptataj en la stacidomo de komitatano aŭ alia samideano, se ili indikos precizan horon de alveno.

**KORAN BONVENON EN ŁÓDŹ!**

**LOKA KONGRESA KOMITATO:**

Prezidanto: (--) Dro J. Mędrkiewicz. Ĝen. Sekr. (--) I. Lejzerowicz.

## **ŁÓDŹ — URBO DE LABORO.**

### **Geografiaj sciindaĵoj.**

La geografia situo de la distrikta ĉefurbo Łódź (esp. Lodz) estas la jena: Longitude 50° 46' 45", latitude 19° 27' 44". Plej alta punkto super la Baltika maro — 232,1 m.

Tra Łódź fluas du tre malgrandaj riveretoj: sude -- Łódka, norde — Jesień. Ambaŭ ili estas brakoj de la rivero Ner.

Łódź, sidejo de Vojevodo, kalkulas ĉ. 600.000 loĝantojn kaj okupas areon de 5875 hektaroj. Sekve Łódź laŭ grandeco estas la dua urbo en Polujo.

### **El la historio de Łódź.**

Kiel fondinton de Łódź profesoro J. Kochanowski kaj P. Muznerowski, aŭtoro de „Kontribuaĵoj al Lodza monografio“ mencias episkopon Gerwardon, oficintan en Kujawy de 1300 ĝis 1323 j. Tiu supozata fondinto de Łódź verŝajne havis en sia emblemo la signon Ł o d z i a (boato) kaj el tio konjekteble devenas la nomo de l' urbo.

Alia dokumento, enhavanta historian mencion pri Łódź, estas la skribaĵo de Władysław, princo de regionoj Łęczyca kaj Dobro, datumita la 6-an de septembro 1332 j. En tiu skribaĵo la princo difinas la privilegiojn, kiujn ĝuas la loĝlokoj en regiono Łęczyca, submetitaj al regado de la kujawaj episkopoj, kaj inter tiuj loĝlokoj estas ankaŭ menciita la vilaĝo Lodza.

Oni ne scias precize, kiam Łódź estis nomata urbo. Restis tamen dokumento, pruvanta, ke jam en la jaro 1424 Łódź estis urbo. Ĝi estas la dokumento de episkopo Jan Pella, difinanta la privilegiojn kaj devojn de la Lodza urbanaro.

Post 9 jaroj, t. e. en 1433, dum la kunveno de l' sejmo en Koło kaŭze de la militiro kontraŭ la Krucordeno (Krzyżacy) estis al Łódź donita la privilegio, liberiganta la loĝantaron el sub la regado de ŝtato-oficistoj. De tiam Łódź estis sub la magdeburga leĝo (anstataŭ la pola), kaj ĉiuj polaj moroj kaj kutimoj, kontraŭaj al la magdeburga leĝo, estis nuligataj.

En 1459 j. Łódź ekipis unu armitan soldaton por la milito kontraŭ la Prusoj.

En ĉiuj-ĉi dokumentoj ĝis 1792 j. Łódź estas menciata kiel urbeto. Tiu-ĉi difino pravas, ke Łódź estis efektive nur tre malgranda, sensignifa urbeto.

En 1793 j. — post la divido de Pollando — Łódź transiris sub prusan regadon kaj de tiam devenas la unuaj statistikaj detaloj: 190 loĝantoj kaj ĉ. 200 domaj bestoj.

Rompo en la vegetado de Łódź fariĝis en la unuaj jaroj de la Kongresa Reĝlando, kiu ebligis instaladon de industriaj laborejoj. Eminentan rolon tiurilate ludis Geyer, kiu konstruis grandan kotonŝpinejon, kaj en 1835 j. venigis el Anglujo la unuan en Pollando vapormaŝinon. En 1854 aperas en Łódź Scheibler, fondanta la unuan mekanikan teksejon de kotonajoj. En la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento Łódź eniras en fazon de moderna grandindustria produkta-



Urbodomo kaj protestanta preĝejo.

do. Ek de tiam Łódź kreskas eksterordinare rapidege: 1850 j. — 15.000 loĝ., 1870 — 50.000 loĝ., 1897 — 314.000 loĝ. Mallonge antaŭ la eksplodo de la mondmilito la nombro de loĝantoj superis duonmilionon. El ĉiuj grandaj eŭropaj urboj Łódź estas la sola, kiu kreskis ne laŭ malrapida grada evoluado, sed kun fenomenaj, „amerika“ rapideco.

### Lodzaj industrio.

Ceftraĵo de la Lodzaj industrio estas la kotona produktado, okupanta ĉ. 100.000 laboristojn, kaj funkciiganta 2.313.989 maŝinojn. Tiuj ĉi nombroj ebligas imagon pri la giganteco de la laborego, farata en Łódź. La lodzaj varoj estas destinataj por grandega eksporto eksterlanda. En la j. 1927 Łódź liveris varojn al diversaj landoj (Ameriko, Anglujo, Oriento, Rumanujo, Rusujo k. a.) por la sumo de 59.227.000 zł.

Ĉ. 40 grandfabrikejoj posedas po pli ol 500 laboristoj, inter ili la plej granda estas tiu de „Widzewska Manufaktura“ kun 8.500 laboristoj. Tiu-ĉi fabrikejgo posedas ŝpinejon, teksejon, blankigejon, far-

bejon, presejon, pretigejon, gasejon, elektrejon, fandejon kaj maŝinfabrikon. (Dum la Kongreso okazos speciala ekskurso en tiun interese-gan unikan fabrikejon de Pollando).

Al la aliaj grandaj fabrikoj apartenas: „Scheibler k. Grohman“ (9817 laboristoj), „I. K. Poznański“ (4297 lab.), „L. Geyer“ (4205 lab.); „N. Ejtingon“ (1028 lab.) k. m. a.

En la j. 1928 Łódź eksportis 83.347,2 tunojn da varoj.

(El la verko de Edward Rosset „Łódź — miasto pracy“).

## ESPERANTO EN ŁÓDŹ.

Unua rondeto esperantista en Łódź estas menciita en la j. 1904. Post kelkaj jaroj, en 1908 denove aperas ia rondeto, kiu tamen ne legaligita de la rusa registaro, rapide malfondiĝas.

Definitive, en 1913 legaligas alia grupo Esperantista en Łódź, kies agadon tamen interrompas la mondmilito.



— Domego de la Lodza vojevodejo.

En la jaro 1917 dank' al la iniciatemo de kelkaj bravaj samideanoj (Zys, Hiller, Hinz k. a.) fondiĝas Lodza Esperanto-Societo, prezidata de konata poeto Heinrich Zimmermann. Multaj kursoj, kelkaj tre sukcesaj ekspozicioj k. a. aranĝoj esperantaj kaŭzas, ke en Łódź nia movado distingiĝe kreskas kaj disvolviĝas, dum efektive en la tuta lando nia afero estas paralizita pro la mondmilito.

Bedaŭrinde la bolŝevika milito denove haltigas por kelka tempo la antaŭeniradon de nia movado en Łódź. Niaj plej agemaj samideanoj foriras por defendi la liberecon de la lando, orfigante Lodzan Esperanto-Societon. Forveturo de l' prezidanto al eksterlando en 1922 definitive kaŭzas provizoran likvidon de l' societo.

Tiam aperas en Łódź laborista E-societo „Laboro“, kiu disvolvas apartan agadon inter Lodzaj laboristoj. Ĉiam pli kaj pli bone pro-

gresante, tiu societo nun dank' al atentinda kunlaboro de kelkaj novaj meritplenaj membroj, posedas grandan anaron, gvidas tre multajn ĉiutagajn kursojn kaj faras bonan propagandon de Esperanto inter la laboristaro (ĝia adreso: Laborista E-Societo „Laboro“, Łódź, Zachodnia 66).

Intertempe, dank' al sistema agado de kelkaj E-istaj instruistoj estas aranĝataj kursoj de Esperanto en kelkaj Lodzaj lernejoj (3 popollernejoj kaj unu gimnazio). Tiuj kursoj vekas grandan intereson inter la lernantoj, kiuj komencas korespondadon kun samaĝuloj el aliaj landoj. Pri tiuj korespondadoj estis atentigitaj la lokaj komitatoj de klerigado.

En 1929 estis refondata Lodza Esperanto Societo, kiu per vico de kursoj, prelegoj kaj interesaj artikoloj en loka gazetaro sukcesis plivigliĝi nian movadon en Łódź. Estas ankaŭ ĝi, kiu invitis la IV-an Tutpolan Kongreson.

Komp. Ilo.

## Łódź.

Nigra urbo fumkovrita vomas ŝviton de gefiloj,  
Al ĉielo portas ĝemojn de malsato kaj malfort' —  
Dancas dancon de penado laŭ la ritmo de teksiloj,  
Murdas vivojn, kreas novajn — laŭ eterna sia sort'...

Jen aŭdiĝas fajfsireno el ruĝbrikaj la uzinoj,  
Ripozadon ĝi anoncas al lacega teksistar'.  
Ĉu ripozon ili ĝuos ĉe bruado de maŝinoj,  
Kiu tage, nokte fluas kun la fum' de l' kamenar'?

Ho, la fumo! Tiu fumo, kiu manĝas pulmojn junajn!  
Nigra fumo, kiu baras la rigardon al belvid'!  
Ĉu eterne ĝi mordados, anstataŭos brilojn sunajn,  
Elsucante homan forton ĝis la lasta gut' de ŝvit'?!  
Varoj, ŝtofoj — milionoj!, kiujn el substancoj krudaj  
Kreis ili — la sennomaj grizaj homoj de labor' —  
Mem mizeraj, malsatantaj, mem senhavaj, ve! kaj nudaj  
Ili teksas por la mondo — ironio kaj dolor'!

Kreu, ĝemu, teksherooj! Ĝis kun lasta la fadeno  
Vi elŝpinos la malsanajn pulmojn kun fumnigra sang'!  
Jen priploros vian morton zumo de fabriksireno —  
Vakan lokon vian petos nova laboristfalang'...

I. Lejzerowicz.

## ŁÓDŹ.

Venas tempoj, kies signo estos vetkuro de laboro, kiel  
antaŭe estis vetkuro de fero, kiel antaŭe estis vetkuro de  
sango.  
Marŝalo Józef Piłsudski.

**L**ódź entute estas nova urbo. Ankoraŭ antaŭ 150 jaroj tie, kie nun bolas febra laboro, grincas miloj da teksiloj kaj fajfas fabrikaj sirenoj, — malgranda ducentthoma kolonio vegetis inter pratempaj arbaroj, kaj hurlado de malsataj lupoj surdigis ĉiun eĥon de la vasta mondo. Iom post iom, dank' al la atento, kiun direktis al nia urbo la Warsawaj registaroj, komencis enmigradi tutaj vicoj da sak-saj kaj sileziaj koloniistoj kaj kun ili multe pli grandaj kamparanaj amasoj el la ĉirkaŭaĵo — ĉiuj sin jetis al komuna malfacila penado-

konstruado de Łódź, estonta ĉefurbo de la pola laboro. Ŝvito de la ciga streĉo fertiligis la teron, originis ĝian rikolton kaj faris la urbon promesita lando ne nur por la ĉirkaŭaĵo sed ankaŭ por la tuta vasta regno.

\* \* \*

Jen estas historio de Łódź; kiel vi vidas estas ĝi entute alia kaj iel stranga, kompare al aliaj samgrandaj urboj, kiuj fieras pro diversaj kuraĝplenaj aventuroj, pro travivo de grandegaj historiaj tempestoj, pro nasko aŭ gastigo de diversaj eminentuloj kiuj poste, dankaj, disportis la famon de sia urbo per glavo aŭ vorto.

Nia modesta, kaj senfama Łódź naskis kaj edukis nur simplajn formikojn, grizajn soldatojn de ĉiutaga malmola laboro. Ja entute kompreneble. Tiuj aliaj urboj iĝadis dum multaj jarcentoj aŭ jarmiloj. Nia ekz. nur dum unu periodo de 110 jaroj kreskis... 600 oble! Tia nombron vi ne trovos en Eŭropo, en Ameriko — nur malofte.

Jen karakterizaĵo. La jaro 1839 estas „brila“ dato en historio de Łódź. Ludoviko Geyer venigis por sia fabriko la unuan en Polujo vapormaŝinon. Tiu-ĉi dato estas simbolo de la vekiĝanta pola Menĉestero, komenco de la mekanika grandindustrio.

\* \* \*

Łódź fieras per sia originala blazono: boato kun remiloj. Ho, ironio! Dum la germana okupado oni superŝutis la malbonodorantajn restojn de la „rivero“ Łódka — por starigi sur ĝia loko ĝardenplacon. Tiel komplete sekan urbon kiel Łódź vi ŝajne malofte trovos en la mondo. Por la nun konstruiĝanta kanalizacio (!) kaj akvaj rezervejoj oni venigas akvon el... Pilica (ĉirkaŭaĵo de Tomaszów).

\* \* \*

Kie ajn vi grimpos sur tegmenton de ia ajn 5-etaĝa domo, — ĉie prezentiĝos al vi la sama ĝeneralvidaĵo de Łódź: kamentuboj, kamentuboj kaj kamentuboj. Unuj fumantaj, aliaj jam ĉesis fumi (bankrotoj kaj juĝkontroloj). Se iu scius eluzi la kaŝitan energion de tiuj fumnuboj por pli ekonomia kaj humanitara celo ol por veneni la lodzan aeron, li superus en la rezultoj eble la energiajn eblecojn de Njagara.

Do ni rigardu kaj admiru. Apude „elektristoj“ boras grandan artezian puton. Iom flanke potencaj trajnaj elevatoroj ŝutas tage kaj nokte karbon la lodzan artiklon de la unua bezono. Dekstre, mal-liberigita inter du kamentuboj pafas supren la gotika pinteto de la katedralo. Kaj jen, malproksime, rigardu, rigardu! Tutaj maro da lumetoj: vespera laboristŝanĝo en „Widzewa Manufakturo“ \*). En la dua rando de la urbo staras kvazaŭ citadelo kelkaj vicoj da solidaj laboristaj domoj, antaŭ nelonge finkonstruitaj de la socialista magistrato. Se vi bone streĉus la okulojn, vi rimarkus ian strangan arbustan objekton sur tegmento de la najbara domo: efektive, erarinta arbo malĝoje levas siajn brakojn ĉielen. La sentema lodzano plantis ĝin tie, por esprimi sian sopiron al tiel malofta ĉe ni verda libero. Kaj kio ĝi estas? Sur longa strato kuŝas ia sabla montaro, kaj diversloke minacas iaj strangaj pendigiloj? Konstruiĝas lodza kanalizacio. Kaj subite, ĉu vi aŭdas? La kutiman stratan bruon venkas laŭta gajeta trumpetado. Policianoj sur stratkruciĝoj haltigas la trafikon. Jen la majstra

\*) Vizitada loko por niaj kongresanoj.



- **cofać rifiżi** (odmówić), repuśi (odepchnąć), forśovi (odsunąć), ŝan-ĝi (zmienić np. słowo), nuligi (znieść), senvalorigi (unieważnić), tuŝi (naruszyć)
- **cofać się** retirigi, sin retiri, forlasi, fortimiĝi, rezigni
- co ĝorsa pli bedaŭrinde,** pli danĝera
- **cokolwiek iomete** (odrobine)
- co krok ĉiupaŝe** (na każdym kroku)
- co najwyżej maksimume**
- **coŝ iom** (niewiele)
- co się tyczy** koncerne
- co to ju-des, kiam-tiam,** foje-refoje
- co większa** pli ĝrava, eĉ cytrol (bot.) citrolo, citrolo (arbuz)
- cuchnacv malodora,** abocudacznv groteska, fantasta, fantastika, fantazia
- **cudak** groteskulo
- **cudny rava** (zachwycający), mireĝinda, ĉarmega, ĉarplena, mirbela, mirplaĉa, sorĉa, sorĉiĝa
- **cuĝle** konduktilrimenoj, direktiloj
- cukrzyca** melita diabeto
- **ćwiczyć dresi** (tresować) toro, botaŭro
- cwikier nazumo,** nazpinĉilo
- **ćwiek lignonaĵo**
- ćwierć litra** kvaronlitro
- ćwierćwiekowy** kvaroncentjara
- **cyĝarniczka** cigarediĝo
- cyrkowiec** cirkisto, artrajdisto, cirkuldisto
- cyrkularny** cirkula, ĉirkaŭa, distrikta
- cyrkumcvzja** cirkumcido, ĉirkaŭtranĉo (obrzezanie)
- **cyroĝraf** ciroĝrafo (własność)
- cyrylica** ciriliko (alfabet ruski)
- cytat** citaĵo
- cytraty** citrato (sole kwasu cytryn.)
- cytrol** (bot.) citrolo, citrolo (arbuz)
- cytronat** (bot.) cedrato (cedrat)
- cytrul** citrulo, akvofono
- cytrynjan** citrato
- cytvar** (bot.) kurkumo
- cywil** (milit.) civulo, laiko
- **cywilizacja** kulturo
- **czaić się** ŝtelkaŝiĝi, in-sidi je kiu
- czai teo** (herbata)
- czako** ĉako
- **czapla** (zool.) herono
- czapla bak** bovbirdo, bu-toro, botaŭro

- cezar** cesar (cesarz)
- cezaropizm** cesaropapismo
- cezjum** cezio (cez)
- cezura** cezuro (średniówka)
- chabazie** malbonherbo, fiherbo, herbaĉo (chwast)
- **chaber** centaŭreo
- chabina** verĝeto, branĉeto (róźdźka, pręt)
- chabus** laĝetfiherbo (chwast w stawie)
- chachaica** neĝblovado, neĝblovego
- chacisko** fikabano
- chaja** uraĝano, ventego (zawierucha, burza)
- chajder** federo, juda lennejo
- chalcedon** (min.) kalcedono, heliotropo (heliotrop), frizoprazo (krizopraz), karniolo (karniol), karneolo (krwawnik), onikso (onyks), sardonikso (sardonyks)
- chameleon** (zool.) kameleono (kameleon)
- chameojdy** (z ptaków) fameoĵoj
- chamsin** hamsino (wiatr)
- chamstwo** krudparolo (mowa ĝburowata), krudkonduto (ĝburowanie)
- chaszce** densejo, densejo, fiplantaĵo
- **chciwość** avido
- **chciwy** dezireĝa, soifa (pragnący)
- chĉ** przyzodobania się plaĉemo
- chelonety** (z pajęczaków) felonetoj
- cheloniarje** (z motyli) feloniarioj
- chelbotanie** w żołądku rulado, murmurado en stomako
- chelmik** (bot. z wargowych) skutelario
- chelpa** (bot.) kleono
- **chelpliwy** fierema, vanta

- **chapać** avide kapti
- **charakterystyczny** siĝnifa (znaczący), difina (określający)
- **charczec** stertori, stertorspiri
- charlacki** malsanema, kaudukema, mizera
- charlactwo** kakekto, kafeksio
- charlaczy** marasma
- **chart** vertrago, ĝrajhundo
- charybda** ĥaribdo (wirmorski k. Mesyny)
- charytatywny** mizerikordna, kompatema, bonfar(em)a, almozdona, ĥaritativa

- chemikalja femiajo**  
**chepta fiberbo**  
 •cherlać misprosperi (nie mieć powodzenia)  
**chetognaty** (zool. z obleńców) fetognatoj  
 •chetny komplezema, kontenta, plezurema  
**chil** (anat.) silo (mlecz, sok pokarmowy, ciecz limfatyczna)  
**chimerydy** (z ryb) fimeridoj  
**china kino** (kora chinowa)  
**chinowe drzewo** kinina arbo, cinhono (chinowiec)  
**chromancja** firomancio (wrózenie z rak)  
 •chirurg hirurgo  
**chiton fitono** (ubiór grecki)  
**chityna fitino** (materia twórcza czlonkostawych zwierząt)  
**chiwian lepki** (bot.) ailanto  
**chlapa babibulo, cikaristo** (plotkarz)  
**chlapawka pluva plaudado, kotajo**  
**chleb z masłem** buterpano  
**chlebnica panŝranko**  
**chleboдрzew** artokarpo  
**chlebowy kamień** artolito (artoliti)
- chleplać sorbi, englutaci** (łykać), enŝmaci  
 •chlipać englutaci, enŝmaci  
 •chlód mal-, sen-, sentemo (obojętność)  
**chlodek malvarmeto**  
**chlodek zajęczy** (bot.) hieracio (kosmaczek, bożymech)  
**chlodawy malvarmeta**  
 •chlodny indifерenta (obojętny), malsentema (nieczuły), sensentema (niewrażliwy)  
**chłonać sorbi, ensorbi, absorbi, engluti**  
**chłonny gruczoł** limfaglando  
 •chłop kamparano, viro, knabego, vilaĝulo, bravulo (dziański)  
 •chłopak grumo (lokajczyk), bottirilo (do butów)  
 •chłopiec bubo  
 •chłopokու centaurо  
 •chłopstwo viraro, bando, soldataro, kanajlaro (fotry)  
**chlorek sodu** natrio klorida  
**chlorofil** klorofilo (zielona substancja roślin)  
**chlorowiec** halogeno, haloido  
**chlorowódor** klorhidro (kwas solny)

- ciemiernica** (bot.) vera-tro  
 •ciemie parieto  
**ciemnia optyczna** mal-lumĉambro, mallumejo  
**ciemnobłękity** malhelblua  
 •ciemność malklareco  
 •ciemny bruna (brunatny np. cera), malbenita (przekłety np. moce)  
 •cieniować modifi, mildigi, ombrumi, nuanc- (desegni)  
 •cień (ast-) eklipsa  
 •cienki malgrasa (chudy)  
 •cienkrusz fuŝvino, fuŝbiero, fivino  
 •cieplarnia varndomo, varmkulturejo, varmhalo, varmigata planthalo  
 •cieplomierz termometro  
 •cieplooporność adiabateco, varmnepenetrebleco  
 •ciepłota temperaturo  
 •ciemle ĉirkaŭbari per dorno  
**ciemnie białe** (bot.) berberido, berberiso (berbersy, glinka cierniowa, piwnik)  
**ciemnik** (z ryb) gastero-steo (jazwica, kacik, kolkka, kostyr)
- ciemniogłowy** akantocefala, dornokapa  
**cierpieć na ból zębów** suferi pro dentodoloro  
 •cierpki riproĉa (słowa)  
 •cierpliwy atendema  
 •cierpliwosć toleremo  
 •cierpnać rigidigi  
 •cieśnina marstrato  
 •ciężar troŝarĝo  
**ciężar gatunkowy** specifa pezo  
**ciężarna** gravedulino, gravedanta  
 •ciężki peziga, laciĝa, inerta (bezwładny), grava (np. rana)  
 •cios atako (uderzenie)  
**ciśnienie atmosf.** atmosf.era premo  
 •cisza kvieto (spokój)  
 •ciurkiem gutflue, ŝnurflue  
 •cikliwić tikli  
 •cikliwy tiklozentema, tuŝsentema  
 •cmentarz enterigejo, mortintejo  
 •cmokać ŝmaci, lipklaki  
**co gna ĝisplene, ĝisfun-**  
**co chvilę** oftmomente, ĉiumomente, jen kaj ien  
 •co do rilate al

- ciąćkać się z kimś trakti ciałki (do gimnast.) kufate  
 \*ciąg dalszy plia listo  
 \*ciągle seninterrompe (ciam-)daure, kontinue  
 ciagliсты glutiriga  
 ciagliwy etendebla  
 \*ciągly ciama, daura, plua  
 \*ciągnąć aerflugi (lecieć w powietrzu), malakceli (nie przyspieszać), paši, marši (sić)  
 \*ciągnąć się laŭviciĝi (zuarzec się w szeregu), etendi sin (rozciągać się)  
 ciałka krwi fagocitoj (fagocyty, leukocyty, komórki wędrujące)  
 ciałka białe krwi blankaj sangokorpetoj, leukocitoj  
 ciałka czerwone krwi rugaj sangokorpetoj, rugaj sangeroj, eritrocitoj  
 \*ciało astro (niebieskie), institucio, korporacio (instytucja)  
 \*ciapać faligi (strącać)  
 \*ciasto bakajo (pieczywo), fadenvermicelroj (ciasto lane)  
 \*cięża gravedeco; grave diĝi (zająć w ciężę)  
 ciężenie gravitado, atrakto  
 cięćciorka (zool.), lolo (bot.) kałol roczny  
 \*ciekać się pariĝi (grzać się)  
 \*ciekawość kuriozajo, interesajo (rzecz ciekawa), interesigo (interesowanie się)  
 \*ciekawyy atentinda, atentiga (zwracający uwagę), interesa, sciinda (wart poznania)  
 ciekawy człowiek scivolulo, gapulo (gapiący się)  
 \*ciekly likva, fluaĵa  
 cieleśnik voluptemulo  
 ciele morskie foko (nerpa)  
 ciemieć ŝamo (zamsz, cymes)  
 ciemieniowy verta, parieta

- chloroza klorozo, kloroso (blednica)  
 \*chlosta vipado (biczowanie)  
 chlupać ŝpruci  
 chłysnać englutaĉi, englutegi  
 \*chłystek mizerulo, mizerera kreitajo, maŝatindulo, malseriozulo, fiknabo  
 chmal ligna najlo en arbo (ćwiek)  
 \*chmielarnia lupolkampo, lupolplantaro  
 chmielowate (bot.) iupolacoj  
 \*chmurny malĝaja, malhela, nubmiena (z mianą chmurną)  
 chmurowładny nuboreganta, nubestra  
 \*chmurzyć się malheliĝi (ściemniać się)  
 chobot ŝuaĉo, abelejšnuro, bastŝuo  
 chobotać brui  
 choćby tylko dlatego estu nur pro tio, eĉ nur pro tio  
 chochelka ĉerpkulero  
 chochoł pajlopupego (lalka ze słomy)  
 chochoł (z gryzoni) miogalo (kretomysz, ostropysk, ślepuszonka)  
 chodaczkowy szlachetc bastŝunobelo, mizera nobelo, kaduknobelulo  
 chodnica flanktabulo  
 \*chodnik koridoro  
 \*chodzić marŝi, frekventi (uczęszczać)  
 chodzi o to temas pri tio (jest przedmiotem), estas parolo, demando pri (jest mowa, sprawa), estas bezona (jest potrzebne), pripravolata (omawiane), traktata, atakita (zaatakowane), koncerna (dotyczy), ni celas (mamy na celu), ni pensas (mamy na myśli); ĉagrenas (sprawia kłopot), apartenas (należy), okupas (zajmuje), interesas (interesuje), koncernas (dotyczy); estas en danĝero (jest w niebezpieczeństwie), estas minacita (jest zagrożone), grava (ważne), deziranta (pożądane), dezirinda, akirinda (warte nabycia), serĉata (poszukiwane), postulata (żądane), postulinda (pożądane)  
 chojniaĵ pinarbeto  
 chojniaĵ (zool.) pinlofiro (borecznik sosnowiec)  
 choledografia (med.) gatalogio

cholelit galstono	*chór horejo (miejsce dla chóru), angelaro (aniołów)
cholerođur holeritifo (góraczka po choleroze), postholeritifo	*chórzysta horano
*choleryczny kolera	*chować flegi (pielęgnować), havi ċe si (mieć u siebie)
choleryna holerino	chować się rifuđi (schronić się)
*cholewa bottubo, šuttubo	chowanka kašadludo (zabawa w chowanego)
chomađo kolbrido, ċevalkolumo	*chrabaszcz melolonto (chrząszcz)
*chopnać ekbateđi	chrabust (bot.) cirsio (ostrożeń)
*chorať himno	chram templo, idolejo, idolkultejo
choreomanja dancomanio	*chrapać dormeđi, nazospiređi, ronkspiri
*choroba malsano, epidemio (nagminna), adenopatio, adenio (gruczołów), glandmalsano (gruczołów), neŭropatio (nerwów), nauzeo (morska), balismo (św. Wita), Basedova malsano (choroba Basedowa), rena malsano (nerkowa), rakito (angielska), štofinteršaŋga malsano (przemiany materij), kormalsano (serca), hautmalsano (skórna)	*chrapakka nazflugilo, kontraŭemo
chorobotwórczy malsaniga	*chrapiły raŭka
chorobotwórczy pierwiastek malsanero	chrapot stertoro
chorowanie malsanado	chrestomatja hrestomatio (zbiór wyborowych utworów prozy)
*chorowity malsanemulo	chrobak (robak) vermo; ċagreno (zmarwienie), riproċo (wyrzut)
chory na raka kancer-malsanulo	chrobotliwy hruetema, krakema
chorzeć malsani	chromotypja ĥromotipio
	chromowy kwas kromacido
	chromowy siarkan. kromisulfato

*chronić ġirmi, protekti, kontraugardi, defendi, flegi	*chudy malgrasiđinta, maldika, malriċa, mizeriđinta
*chrupać krakmaċi, maċmordi, krakmordi, krakmangi, makzelumi	chudniċie maldikiđo
*chrypnać raŭkvoki, raŭkkrii, raŭkparoli (mówić ochryple)	chudzina mizerulo
chryzmo ĥrizamo, krismo (krzyżmo do bierzowania)	chusta na głowę kaptuko
*chrząkać ekronki	chustka naztuko, šultrotuko
chrząstkoszkiełtowe (z ryb) kondropteriđioj	*chwalca flatisto, panegiristo
chrząszcze (z owadów) koleopteroj	*chwast kvasto (kutas), herbaċo (zielsko)
chrzcielnica baptejo, bapta pelvo, baptujo, bapтакvujo, bapťka-pelo	chwiejny šaŋganima
chrzest przyjąć esti baptita	chwiejny (fiz.) nestarema (np. równowaga)
*chrześniak baptinfano	*chwilka iomtempo, iomajo, ċiumomente, jen kaj jen (co chwile), iom, por iom, por momento (na chwilkę)
*chrzęścić kraki	*chwilowy laŭmomenta, enmomenta, dummomenta, pormomenta, iomtempa, duma
chrzymować ĥrizami	chwošt vosto
*chuć (med.) apetenco (żądza np. jadła)	*chwycić kaperi (mar.), endentigi
*chuchać blovspiri, spirobłovi (dmuchać oddech), karesbłovi (dchem), karesbłovi (dchem), kareszota), spirvarmigi (grzać oddechem)	*chyba fine, certe neniu, ol li (chyba tylko on), ja (wszakże)
*chudoba brutaro (inwentarz żywy)	*chybiać ofendi (urazić), ċuyooat palanciđi, skuigi
chudonóg (z małp) loriso	chyłić się do upadku kadukiđi
*chudopacholek plebejjo	chyłrzyce (z ryb) aŭlostomoj, fistularoj
	*chżyzość kuro, iro (bieg, chód)

en Eŭropo (Torino 1928) fajra brigado rapidege urĝas al sia misio. La „fajruloj“ estas ĉi tie objekto de speciala simpatio kaj protekto ne nur flanke de socio, sed precipe de la riĉaj industriistoj, kiuj plejparte aktive kunlaboras. Plej populara estas inter ili Grohman, la komandanto, ĉiam montranta sin al „la popolo“ en sia simpla modesta brigadista uniformo. Kaj jen Piotrkowska str., la ĉefstrato, dronanta en reklama lumo kaj trafika bruo, plenŝtopita per homa formikaro. Okulfrapas la ofta najbareco de la 5—6etaĝaj gigantoj kun liliputaj kabanjoj. Signo de tro rapida kresko de Łódź. Precipe malĝoje impresas la multo da nefinitaj konstruaĵoj. Staras ili diversloke, kvazaŭ nudaj skeletoj. Rigidiĝis nun ĉio en la furiozanta krizo.

\* \* \*

La lodzaj stratoj formas reton de linioj vertikalaj kaj horizontaj, al si paralelaj. En estonteco, kiam nia „Menĉestero“ pligrandiĝos estus racie por rapida orientiĝo ilin simple laŭ New Yorka modelo denombri. Dume estas Łódź kuriozaĵo kun sia Piotrkowska strato. Ĝi estas la unusola arterio en tiu-ĉi vivega organismo, la koro, kapo kaj cerbo. Centrego de la lodza vivo. Kien ajn vi flankeniros de la Piotrkowska, estas kvazaŭ vi troviĝus en malgranda urbeto. Estis jam faritaj provoj por arte forkonduki iom da tiu pulsanta vivo en aliajn stratojn, sed sensukcese. Lodzanoj tro forte kunviviĝis kun sia „Pietri-na“, ĉi tie ili rendevuas, promenas, amuziĝas, manĝas kaj prizorgas la plej grandajn kaj plej malgrandajn tranzakciojn. En Łódź laŭvorte ĉiu vojo kondukas tra Piotrkowska. Tial nur ĝi havas vere grandurban aspekton. Tial nur sur ĝi regas konstanta viglega trafiko. Mi vetos, ke en la unuaj momentoj, vi, nelodzano, ne scipovos iri sur ĝi. Oni vir puŝos ĉiuflanken, piedpremos, per kubutoj disbatos, ĝis vi „kaptos la ritmon“ kaj kunmarŝos.

Se vi ne estos „en ĝi“, vi neniel komprenos, kial kaj kien tiuj homoj, ŝvitante kaj ekscite gestadante, rapidas. Vivo estas vetkurado. Se vi ne sufiĉe rapide kuros, vi malfruiĝos kaj malgajnos. Laŭ la Darwinata batalo por ekzisto nur la fortaj, harditaj kaj rapidaj restas sur supraĵo. Aliaj dronas en mizeron. Nenie tiel klare, kiel ĝuste en Łódź, vi okulfrape, se vi nur lernos rigardi, vidos tiun-ĉi batalon por pli bona estonto tuj rimarkebla trajto de la lodza strato. Sur la vizaĝo de lodzano pentriĝas konstanta zorgo por vivteno.

\* \* \*

Kion ni montru al vi, karaj gastoj, vizitontaj nian urbon. Nek per moderneco, nek per antikveco ni povos imponi al vi. Stratoj, krom la ĉefa, neasfaltitaj (multloke — „katkapaĉoj“), muzeoj projektataj, teatroj en modestaj luitaj domoj. Eĉ la preĝejoj, kiujn vi tiel volonte vizitas en ĉiuj urboj ĉe ni certe ne allogos vin. Tro novaj ili estas, sen historiaj tomboj kaj bedaŭrinde la muroj estas tutaj, sen ia ajn antikva difekto. Eĉ per monumentoj ni ne povos fieri. Eŝafodo sur Placo de Libereco ankoraŭ kovras la lokon, kie baldaŭ ekstaros la sola monumento en la urbo, tiu de Kościuszko.

Mankas tradicio, mankas historio. Pli ĝuste ĝi ne mankas, ĝi nur skribiĝis sur apartaj folioj, ĝi pulsas en formo de famaj baraktoj de laboristoj kun la potenca carismo. Por libero kaj socialismo. La tombejo kun la modesta monumento en la Konstantina arbaro, estas celo de

la ĉiujaraj unuamajaj demonstracioj. Kuŝas tie kuraĝplenaj ribelintoj, pendigitaj aŭ mortpafitaj de rusa perforto. Grizaj herooj de socio kaj nacio.

\* \* \*

La koro de nia urbo konstante batas per ritmo de milionoj da teksiloj. Ĉiu uzino estas siaspeca epopeo. Ĉiu maŝino povus multe rakonti pri sia „mastro“, kiun ĝi ofte sklavigas. Se li ĝin malzorgas, aŭ malatentas, ĝi venĝas sin ofte per kripligo. Li kaj ĝi unusama animo. Rigardu lin kiel silente li ĝin ĉirkaŭiras, kiel atente li aŭskultas ĝian egalmezuran ritmon. Ĉu vi scias liajn pensojn? Lia vivo senespera, kiu ĝin konas?... Bonedukitaj poetoj preteriras tiujn homojn, kiuj nur ŝokas iliajn estetikajn delikatajn sentojn. Kaj tamen troviĝis artistoj, kiuj scipovis elsorĉi kantojn de tiuj bruaj kaj malhelaj ejoj, enrigardis funden en la okulojn de „Parioj“ kaj vidis belon kaj noblon.

Nenie en la mondo tiel proksime apudvivas komforto kaj mizero. Palaco de fabrikanto najbaras kun t. n. familiaj domoj, kie nestas malvasto kaj malriĉo.

Se vi volos viziti la lodzajn tombarojn, vi certe admiros la arton de la gigantaj maŭzoleoj. Elirinte, vi tuj eniĝas malpuran mizeran laboristan kvartalon — fama Bałuty, kie krimulo embuskas sur stratangulo, kaj el domaĉoj kriiĝas voko de malsato.

Vizitis foje tian korton ministro „la fluganta Holandano“, kaj trovinte ĉion en ordo, manpremis kun 50 zł.-bankbileto la kortuŝitan pordegiston. Sed, sinjoro ministro, ĉu vi ne aŭdis pri Potiomkinaj vilaĝoj?

\* \* \*

Ĉi tie oni lernis ŝati tempon, kiun oni egale traktas kun mono (en multegaj kontoroj pendas tiu amerika sentenco), ĉi-tie oni plej bone komprenas laboron, ĉi-tie ekonomiaj aperaĵoj resonas per plej rapida eĥo. Kreiĝis tipo: „Lodzermensch“-homo, ofte ridinda de kultura kaj poltradicia vidpunkto, sed malgraŭ tio vasta ekonomia mensso, kapabla kelkfoje hontigi fakajn inteligentulojn. Vidu, kun kia diligenteco li studas la borsan tabelon. Aŭskultu, kiel saĝe li parolas pri la nun reganta krizo. Kiel precize li faras komplikitajn kalkuladojn, skribante longajn kolonojn sur „marmor“ de sia „faka“ kafejo. En lia kapo svarmas diversaj konceptoj, avide li serĉas novajn merkatojn, por la lodzaj fabrikoj. Se Ameriko ne estus jam de Kolumbo malkovrita, certe estus lodzano, kiu ĝin estus trovinta. Kien li jam ne disportis la lodzajn „perkaletojn“? Vi ilin fakte trovos en plej ekstremaj landoj de la terglobo. Lodzanoj estas tre vojaĝema popolo. Por vendi - - nenia lando estas tro malproksima. Generale eksterordinare laboremaj, ĉiam kun provizo de „plej novaj“ spritaĵoj.

En la lastaj jaroj Łódź ĝemas sub martelo de pezega krizo. Venis ĝi neatendite „post sep grasaj jaroj“ kaj furiozas kiel tempesto, nenion indulgante. Neniu urbo en la mondo estas tiel dependa de la konjunkturo. Ĉiuj ĝin sentas. Eĉ instruistoj, ricevantaj ofte por sia salajro kambiojn, kiuj poste protestiĝas. Plioftiĝas bankrotoj de malnovaj potenculoj. Tamen lodzano ankoraŭ ne malesperas. Li scias, ke la lodza krizo estas nur ĉenero de la tutmonda ekonomia katastrofo.

La lastatempa produktado, treege intensigita per la postmilita tekniko, multe postkuris la ĝeneralan konsumadon. En Usono ariĝis dum jaroj grandega supermezuro de ĉiuj krudaĵoj. Tro bonaj estis la lastjaraj rikoltoj (Jen paradokso!). En Brazilo regas vera kafa katastrofo. Oni provis bruligi grandajn amasojn por haltigi la prezon. Sensukcese. Ĝi saltis je 35%. Same kun aliaj produktoj. Oni provis karteliĝi. Sed la ekstera premo estis tro granda. Venis du Wall-Street'aj „krakoj“.

La krizo, kiel ondego iris trans oceanon kaj inundis la turmentitan kaj elĉerpitan post la lasta masakro malnovan Eŭropon. La londonaj aŭkcioj ĉiam notas malaltiĝojn de lan-kotonaj prezoj.

Depost la 1850 jaro, post kiam oni malfermis por Kongrespolujo la doganajn limojn de vastega Rusujo, disfloris la lodza industrio. Post la milito, la landoj fermiĝis en si, ĉirkaŭiĝis per protekciaj bariloj. La granda lodza industrio tekstila sufokiĝis. Restis al ĝi nur la pola kamparano. Kaj nun tiu-ĉi malriĉiĝis.

Lodzano forte „kuntiris la zonan“.

\* \* \*

Ni amas nian malbelan urbon kaj ni perfidos ĝin nek por bela Venecio, kun ĝiaj famaj, mortintaj stratetoj, eĉ nek por la artplena Krakovo kun ĝiaj reĝaj tomboj. Ni amas ĝin certe, kiel patrino amas sian kriplan infanon. Eble ĝuste tial, ĉar ĝi estas tiel duonpatrine traktata. Oni ne havas komprenon por ĝia estonto, iomete timas ĝiajn akrajn sociajn kontrastojn. „Polujo estas agrikultura lando, oni ne bezonas tian grandegan industrion kun koncentriĝo de tiom grandegaj laboristaj amasoj“. Investician prunton ricevas Katowice, kaj la ekspresvagonaro Moskva-Paris evitas 600.000 Lodzan por envagonigi nin en kelkmila Kutno.

Kaj se vero estas, ke laboro tamen enfine devas trovi sian plenan rekompencan, tiam mi forte kredas, ke malgraŭ ĉio Łódź iĝos iam „per mielo kaj lakto fluanta promesita lando“ por ĉiuj ĝiaj gefiloj. Por tiu celo ni laboras.

M. Dembiński.

#### DANKESPRIMO.

Materialon kaj kliŝaĵojn por tiu-ĉi numero afable disponigis: s-o Edward Rosset, estro de Statistika Oficejo ĉe Lodza Magistrato kaj Direkcio de „Widzewska Manufaktura“, al kiuj ni esprimas sinceran dankon pro montrita helpo.

Loka Kongresa Komitato.

## 22-a UNIVESALA KONGRESO DE ESPERANTO EN OXFORD.

**N**ur en kelkaj linioj mi deziras sciigi al nia legantaro plej gravajn rezultojn de la Kongreso, ĉar antaŭ ni staras tute proksime la tutpollanda en Łódź kaj preparaj laboroj por la venonta 23-a en Kraków. Kiu volas pli detale konatiĝi kun la kongreslaboroj bonvolu iomete atendi. Pri diversaj gravajoj oni skribos aparte.

Mi ne parolos pri la ĝenerala impresoj el la fama universitata kaj kolegia urbo Oksford. Ili estas plejmulte vere imponaj. Niaj britaj gesamideanoj ne povis elekti pli oportunan kongresurbon, kvankam ili jam havas en antaŭaj tempoj Cambridge kaj Edinburgon, ambaŭ

gravegaj en la historio de la disvolviĝo de la lingvo kaj ideo esperanta.

Laŭ mia opinio la plej signifplena rezulto estas neniigo de la malkuraĝiganta ĝis nun tutan esperantistaron „viena deficitito“. Ĝi ne plu ekzistas dank' al la oferema laboro de gesinjoroj Blaise kaj s-ro prezidanto Stettler. Ili sukcesis kolekti pli ol 5.000 fr. svisaj por neniigi tiun pezan malagrablajn, preskaŭ malfeliĉon.

Ĉu ne gravas ankaŭ la kreo kaj subteno de la Internacia Ĉe Instituto? Jam komencis vere kreski kaj prosperi la afero de la disvolviĝo de mondlingvo. Plej obstinaj nekredemuloj iom post iom ŝanĝas sian opinion malfavoran por Esperanto.

Estas vere grava sukceso de la lastaj tempoj, ke niaj britaj, gesamideanoj prenas en siajn manojn la aferon de la helpa lingvo. La lingvo angla estas ja tiamaniere disvastigita sur la terglobo, ke fakte aliaj lingvoj pli kaj pli estas forpelitaj el la ĝenerala uzado. Sed niaj saĝaj britaj kaj amerikaj samideanoj vidas kaj antaŭvidas neblon de la altrudo de sia lingvo kaj kulturo al aliaj popoloj de la mondo. Ĉiuj eĉ malgrandaj nacioj nun sentas sian rajton al la komuna kunvivado sen perdo de sia propra kulturo. Ili ne volas resti senrajta. Kio do restas alia ol akcepti alian neŭtralan lingvon sen iu ajn nacia ambicieco?

Kiam tiu pensmaniero disvastiĝos en vastajn rondojn de la anglo, franco kaj germane parolantoj la demando de la helpa lingvo estos solvita favore nur por Esperanto.

Tiam disvastiĝos profunda morala kulturo de anglosaksoj, tiom multe donacinta por la tuta homaro post la kruelaj bataladoj de la granda milito.

Menciinda estas tre agrabla postkongreso en Londono, speciale la aranĝita de ges-roj Blaise tekunveno kun multaj paroladoj de diversnaciaj partoprenintoj. Sed pri la rezultoj — ni parolos aparte. El la paroladoj tre rimarkinda estas tiu de la samideano Hetzel el Usono publikigota en la proksima n-ro de P. E. O. B.

## POLLANDA KRONIKO.

### JAM NE DZIKA-STRATO, SED LA STRATO DE DRO L. L. ZAMENHOF.

La batalado komencita de Akademia Esperanto Rondo por alinomi la straton Dzika tiu de Zamenhof, estas gajnita. La Magistrato, konsiderante la petskribon kun 23.522 subskriboj de plenaĝaj loĝantoj de Warszawa, decidis ĝin alinomi. Ni gratulas al la Rondo, kies iniciato estas kronita per tiel bela sukceso.

**DĄBROWA GÓRNICZA.** Fondiĝis nova grupo tute sendependa, kiu ricevis ejon en Urba Legejo. La estraron eniris s-oj: prez. Jan Nowak kaj C. Rabenda, sekret. J. Durnaś kaj J. Zbrozczyk, kasisto H. Bednarski.

**KATOWICE.** En la loka komerca lernejo s-o Antoni Siwiec prelegis je la temo: „Esperanto en socia vivo“.

**WARSZAWA.** Akademia Esperanto Rondo gvidis dum la libertempo du kursojn. Pluaj kursoj komenciĝas jam en septembro. Ĉe la Rondo fondiĝis sekcio de lerneja junularo sub la nomo „Junulara Espero“, al kiu povos aliĝi gelernantoj de mezlernoj. La Rondo aranĝas ĉiudimanche vespere kunsidojn kun diversaj referaĵoj.

Juda Landkonema Societo aranĝas la 20 kaj 21 de k. m. ekskurson al Łódź, gvidatan de s-o red. Oskar Berman. La partoprenantoj povos ĝui ĉiujn aranĝojn, kiujn preparis Loka Organiza Komitato de la Pollanda Esperanto-Kongreso. Laŭ iniciato de s-o Berman la nomita societo malfermas Esp.-kurson. La jurnalo „Nasz Przegląd“ enpresis longan artikolon s. t. Signifo de Esperanto por turismo, verkitan de s-o Berman. La sama artikolo aperis en germanlingva gazeto eldonata en Łódź s. t. Neue Lodzer Zeitung.



**WŁOCŁAWEK.** Ce Juda Skolt-Asocio fondiĝis esperantista rondo, konsistanta nun el ĉ. 20 personoj. Preparaĝas kurso gvidota de s-o Lesiński.

### ALVOKO.

Okaze de Pollanda Kongreso de Esperantistoj la 20—21 de septembro 1930 en Łódź la Laborista Esper. Asocio „Laboro” en Pollando alvokas ĉiujn pollandajn klaskonsciajn esperantistojn ĉeesti la okazontan la 21 de septembro tutlandan Konferencon de laboristoj esperantistoj celantan la organizon de lab.-esp. movado en Pollando sur firma, unika bazo.

Aliĝoj: Lab. Esp. Asocio „Laboro”, adv. J. Litauer, Marszałkowska 81 — Warszawa.

### NEKROLOGO.

Kun profunda bedaŭro ni sciigas pri la neatendita perdo de nia kara amiko, sinjoro dro med. Grzegorz Sianożęcki, kiu mortis la 10. 8. 1930 en la aĝo de 58 jaroj dum la libertempa restado en Selce, Jugoslavujo. Dro Sianożęcki estis fervora kaj vera samideano, kiu senlace laboris por nia movado en ĉiu ebla maniero. Dum la lastaj monatoj li konstruis en Selce ĉe la marbordo sanatorion „Vilao Esperanto” kaj forveturis inaŭguri ĝin, kaj kia malfeliĉo, li jam ne revenis. Nian karan amikon ni neniam forĝesos. Al la malfeliĉaj edzino kaj filineto ni esprimas nian plej koran kondolencon kaj profundan kunsenton.

Societo de Esperanto-Amikoj Katowice.

## KONKURSO EN VERKADO DE PROPAGANDILOJ.

Nia XXIIIa okazos venontan jaron 1931 en Kraków. De ĝia sukceso dependas la sorto de la Esperanto-movado en nia lando. Tial la XXIIIa en Kraków nepre devas alporti al ni eksterordinaran sukceson. Ĝi devas prezenti manifestacion tiom grandiozan, ke ĝi surprizu kaj konvinku niajn plej obstinajn kontraŭulojn, la lernejojn, la radiostaciojn kaj la gazetaron.

Tio ankaŭ estu la sola celo de nia XXIIIa!

Car la atingo de tiu ĉi celo postulas grandstilan propagandon, necesas, ke ĉiuj gesamideanoj en Polujo komune kaj forte partoprenu en la propagandaj laboroj.

Fiucele la Mondlingvo-eldonejo en Katowice intencas speciale eldoni propagandleteron kaj flugfoliojn plej aktuale verkitaĵojn, kaj petas ĉiujn gesamideanojn partopreni en la konkursa verkado de tiuj propagandiloj.

**Kondiĉoj por la propagandletero verkota nur pollingve.**

La letero portos jenan surskribon:

„Do wszystkich w Polsce istniejących P. T. Towarzystw i Kół naukowych, kulturalno-oświatowych, zawodowych, humanitarnych, turystycznych, sportowych i religijnych, oraz do wszystkich Władz i Instytucji państwowych i prywatnych i do Redakcyj wszystkich poważnych czasopism w Polsce”.

Konforme al la surskribo devas esti verkita la teksto. Per tre afablaj vortoj ĝi montru plej konvinke la nepran bezonon de komuna mondlingvo ĝenerale, kaj de ĝia oficiala uzado en rilatoj eksterlandaj speciale, kaj ke tiun taskon plenumi povas nur Esperanto. Precipe akcentita estu la plej baldaŭa instruado de Esperanto en ĉiuj lernejoj kaj institucioj de edukado. En la fino de la letero oni esprimu la peton, disdoni la almetitaĵojn, flugfoliojn inter la membroj kaj inviti ilin al multnombra partopreno de aranĝotaj kursoj, por ke ili povu ĝui la XXIII-an kongreson, kiu okazos en Kraków.

**Kondiĉoj por la flugfolio verkota nur pollingve:**

Car la flugfolio devas informi la legantojn pri la nuna stato de nia movado, estus dezirinde mencii antaŭ ĉio, ke la venontjara mondkongreso okazos en Kraków, kaj ke neniu preterlasu uzi tiun okazon por mem persone konvinkiĝi, kiel 40 ĝis 50 nacioj per la mirinda grandioza pola eltrovaĵo Esperanto, komune, kaj en plena harmonio laboras por la kultura evoluo de la mondo. Plue oni ion diru pri la historio kaj tradicio de Esperanto, ĝia facileco kompare al aliaj lingvoj k. t. p. En la fino lokita estu la invito al partopreno de kursoj.

Ambaŭ, la letero kiel ankaŭ la flugfolio estu tre koncizaj, ne tro longaj, sed tre trafaj kaj nepre konvinkaj.

La plej bonaj laboroj estos premiitaj, nome, la verkinto de la plej bonaj manuskriptoj por ambaŭ propagandiloj ricevos la „Verkaron de Zamenhof 35 zł.” tiu de la plej bona manuskripto por la letero la „Sanktan Biblion 27,50 zł.”, kaj por la flugfolio senpagan abonon de „Pola Esperantisto” dum 1931 kaj „Humora-

joj" kaj „Lingvaj Respondoj" kune 20 zł. La manuskriptojn oni sendu ĝis la 30. IX. al Pola Esperanto-Instituto, Kraków, Lubicz 34, kiu decidos pri la premioj.

En la konkurso partopreni povas ankaŭ grupoj, societoj kaj rondoj Esperantistaj.

## KOMUNIKOJ DE P. E. D.

Laŭ persona interkonsento kun svedaj samideanoj dum la kongreso en Oksford estas intencate inviti s-on **Lakshmisvar Sinha**, Hindon, kiu dum la pasinta vintro okazigis en Svedujo ĉ. 300 bonege sukcesintajn prelegojn pri sia lando, kiuj eminente helpis tian esperanto-movadon, vekante ĉie grandan intereson por nia lingvo. Laŭ faritaj planoj la preleganto povos halti en Polujo dum novembro kaj decembro, kaj en tiuj monatoj prelegi. P. E. D. intencas preparoli lian vojaĝon dum la kongreso en Łódź, sed bezonas tialferajn deklarojn. Do ĉiuj grupoj kaj izoluloj bonvolu ilin pripensi jam antaŭe por plifaciligi decidon. Ne estas necese speciale substreki, ke antaŭ la venontjara universala kongreso en Kraków ni devas nian socion interesigi por Esperanto, por ke la kongreso fariĝu turnpunkto en nia landa Esperanto-movado.

Ĉiujn esperantistojn ni atentigas pri la alvoko, kiu aperis en la pasintmonata n-ro de P. E. sub tit.: **Księga adresowa esperantystów polskich**. Ĉiuj grupoj bonvolu elsendi tuj la petitajn nomarojn. Izoluloj ankaŭ plenumu sian devon. **Ne malhelpu la laboron!** Traleginte la menciitan alvokon en julia n-ro de P. E. skribu tuj al s-o Jan Zawada, sekretarzo „Laboro", Warszawa, Miasto-Ogród, Czerniaków, ul. Zaciszna 2. **Lasta tempo por ricevo de la nomaroj 30 de septembro k. j.**

## AVERTO!

En Warszawa aperis lernolibro de Esperanto por parolantaj judan lingvon (jidiŝ). Pri tiu ĉi eldonajo estas necese diri kelkajn vortojn, por averti ĉiujn samideanojn kaj kursgvidantojn, ke oni ĝin ne aĉetu. Aperigi tian libron ĝenerale, kaj tian lernolibron speciale, estas vera skandalo. Ĝi svarmas pro multegaj presaj kaj gramatikaj eraroj. Ne estas maloftaj paĝoj sur kiuj mi trovis ĉ. 20 erarojn, kaj kelkfoje en la sama linio mi trovis po tri. Tiom pri Esperanto-teksto. En teksto juda, kiun mi ne scias legi, laŭdire estas ankaŭ multaj eraroj kaj eĉ en titoloj. Aŭtoro de la libro kaŝas sin sub la nomo Dr. Ludwik Zamenhauser, kio plej verŝajne estas tute simpla mistifikajo por erarigi ne sufiĉe bone informitajn kaj kredigi la aĉetantojn, ke aŭtoro de la libro estas nia Majstro. Ne aĉetu ĝin kaj avertu aliajn!

## ALVOKO AL ĈIUJ REDAKCIOJ DE ESPER.-REVUOJ.

Per la nuna numero de Pola Esperantisto ni komencas regulan dissendadon de nia gazeto al ĉiuj redakcioj de Esperanto-revuoj sur la tuta mondo, dezirante tiamaniere diskonigi niajn preparojn por la venontjara Universala Esperanto Kongreso okazonta en Kraków. En P. E. ni informos pri ĉiuj sciindaĵoj rilate la kongreson. Pola Esperantisto fariĝis oficiala organo de Loka Kongresa Komitato kaj ĝi estos dissendata al ĉiuj kongresaliĝintoj. Se niaj monrimedoj sufiĉos, ni prizorgos aperigadi Polan Esperantiston dufoje ĉiumonate, por ke la informoj konatiĝu al ĉiuj Esperantistoj kiel eble plej baldaŭ. Por la bono de tuta Esperanto-movado ni petas ĉiujn redakciojn de Esperanto-revuoj represi la aperigotajn de ni bultenojn pri la Kongreso kaj nepre interŝanĝi kun ni siajn gazetnumerojn.

Unua kongresbulteno aperos en la plej proksima numero de Pola Esperantisto.

Nun ni nur mencias, ke jam aliĝis 25 personoj (Aŭstroj, Britoj, Francoj, Germanoj, Holandanoj).

### RICEVITAJ GAZETOJ.

La publikigitajn ĝis nun listojn de l' ricevitaj gazetoj ni kompletigas jene: **La Revuo Orienta** — monata organo de Japana Esperanto-Instituto, Sin'ogaŭmaĉi III-15, Uŝigome, Tokio, Japanujo.

**Morze** — organo Ligi Morskiej i Rzecznej, Warszawa, Elektoralna 2.

**Literatura Informilo** eldonata de la Esperanto-Fako ĉe la eldonejo Ferdinand Hirt et Sohn en Leipzig.

**Mój przyjaciel** — miesięcznik ilustrowany, podróże, przygody, nauka. Warszawa, Bielańska 5.

Ilustritan Gvidlibron de

## M O N T E C A T I N I

la plej fama kuracloko en Italujo, kun priskriboj de ĝiaj mineralakvoj kaj grotoj (teksto itala kaj esperanta), ne italaj samideanoj povas ricevi petante ĝin per poŝtkarto de

**Regie Terme di Montecatini**

**(Italia) Montecatini Terme.**

Ĉe-Instituto en Hago eldonis belajn **Esperanto insignojn por Poloj.**

La insignoj prezentas du flagetojn polan kaj esperantan kaj estas haveblaj kiel broŝo, butono aŭ pinglo.

Prezo por unu peco 2.50 zł. Por sendkostoj aldonu 10 proc.

Mendu ĉe la **Administracio de Pola Esperantisto. Konto PKO. 406.660.**

## Libreja Fakoj de „Pola Esperantisto“

**Kraków, ul. Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.**

### REKOMENDAS :

Albanio -- Gvidlibro . . . . .	0.60
Albumo de Kraków (34 fotoj) . . . . .	0.80
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot. . . . .	15.00
Ama stelaro . . . . .	1.10
An-Ski -- Dibuk. Teatraĵo . . . . .	1.25
Avsejenko -- Fraŭlino Suzano . . . . .	2.00
Bałucki -- Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp . . . . .	0.60
Baudouin -- La arto de memdisciplino: Psikagogio . . . . .	1.30
Białystok -- Gvidlibro tra urbo de nia Majstro . . . . .	0.60
Blicher -- Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto . . . . .	1.20
Bennsels -- Solandro . . . . .	2.20
Bujwid O. prof. -- Kvin prelegoj pri bakterioj . . . . .	1.00
-- La apliko de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo . . . . .	0.35
Bukedo -- I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po . . . . .	1.20
Bultuis -- Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E. . . . .	1.40
Butin -- Faŭsto. Komentario al la I-parto . . . . .	0.60
Butler -- Himnaro Esperanta . . . . .	3.00
-- Kantaro Esperanta . . . . .	3.00
Campe -- Robinsono Kruso . . . . .	7.00
Cart i Borel -- Esperanto w 10 lekcjach . . . . .	1.30
Conscience -- La leono de Flandrujo . . . . .	11.75
Czubryński -- Esperanto i Esperantyzm . . . . .	1.25
-- Esperantyzm. Wyd. II. . . . .	3.00
Czechowski -- Podróż po świecie dostępna dla każdego . . . . .	0.50
Dobrzański -- Al mokantoj . . . . .	0.45
Dreyfus -- La vangfrapo . . . . .	1.00
Fredro -- Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski . . . . .	1.60
Gemoj de la hungara popolmuziko . . . . .	3.20

<b>Grabowski Ant.</b> — Nova Antologio . . . . .	<b>1.60</b>
<b>Grenkamp-Kornfeld</b> — Krijoj de l'koro. Poeziaĵoj . . . . .	<b>0.50</b>
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj . . . . .	<b>0.75</b>
— Kompletny samouczek jęz. Esperanto . . . . .	<b>1.25</b>
<b>Gryfi</b> — W sprawie nauki języków obcych . . . . .	<b>0.50</b>
<b>Hebbel</b> — Gyges kaj lia ringo . . . . .	<b>6.50</b>
<b>Hiller</b> — Ho, tiuj fremduloj, opereto . . . . .	<b>1.40</b>
<b>Ibsen</b> — Imperiestro kaj Galileano . . . . .	<b>12.60</b>
<b>Ilustrita Gvidlibro</b> tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la P. E. D. Kraków . . . . .	<b>1.50</b>
<b>Insignoj esper.</b> (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10.	
<b>Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1928</b> . . . . .	<b>5.00</b>
<b>Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1929</b> . . . . .	<b>6.00</b>
<b>Jung</b> — La alta kanto de la amo . . . . .	<b>1.80</b>
<b>Kant</b> — Al eterna paco . . . . .	<b>4.40</b>
<b>Kaplan</b> — Akordoj esperantaj . . . . .	<b>0.80</b>
<b>Karinthy</b> — Norda vento; novelkolekto . . . . .	<b>1.30</b>
<b>Kongreslibro de l' VIII. en Kraków.</b> Riĉe ilustrita . . . . .	<b>1.00</b>
<b>Kraków</b> — Urbo de Jubilea Kongreso 1912 . . . . .	<b>0.80</b>
<b>Kriss</b> — Melodoj de l' nokto. Poeziaĵoj . . . . .	<b>1.00</b>
<b>Lange</b> — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski . . . . .	<b>1.50</b>
<b>Lessing</b> — Minna de Barnhelm . . . . .	<b>4.30</b>
<b>Malgranda terbiblio</b> . . . . .	<b>2.00</b>
<b>Multatuli</b> — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie Semarang — Java . . . . .	<b>1.85</b>
<b>Oberrotman kaj Jung</b> — La lastaj tagoj de Dro Zamenhof . . . . .	<b>2.60</b>
<b>Polaj Kristnaskaj Kantoj</b> . . . . .	<b>0.35</b>
<b>Poŝtkartoj</b> (kun moto de Żeromski) 10 pecoj . . . . .	<b>0.50</b>
<b>Ramo</b> — En Svislando . . . . .	<b>4.80</b>
<b>Reymont</b> — En fumejo de l' opio . . . . .	<b>1.20</b>
<b>Słowacki</b> — La patro de pestuloj el El-Arŝ, trad. Ant. Grabowski . . . . .	<b>1.40</b>
<b>Staff</b> — Aŭtunaj agordoj. . . . .	<b>1.00</b>
<b>Sapiro</b> — Babiladoj de bonhumora Zamenhofano . . . . .	<b>1.00</b>
<b>Slosilo esper.</b> en pola lingvo . . . . .	<b>0.60</b>
<b>Tatroj kaj Zakopane</b> . . . . .	<b>0.50</b>
<b>Tichawski</b> — „La Mondlingvo“, podr. Esp. . . . .	<b>5.00</b>
<b>Trochimowski</b> — Kwestja języka międzynarodowego 10 ekz. . . . .	<b>1.00</b>
<b>Turno</b> — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III. . . . .	<b>1.25</b>
— Wyższy kurs . . . . .	<b>2.00</b>
<b>Wells</b> — La dormanto vekigas . . . . .	<b>5.00</b>
<b>Wiesenfeld</b> — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj . . . . .	<b>2.40</b>
<b>Zamenhof, D-o Leono</b> — Mia liro . . . . .	<b>1.10</b>
<b>Zawada</b> — Pełny podstawowy słownik j. Esp. (esp.-pol.) . . . . .	<b>4.00</b>

### La verkoj de Zamenhof:

<b>Fundamenta Krestomatio</b> . . . . .	<b>5.60</b>
<b>Fundamento de Esper.</b> (5-lingva) . . . . .	<b>2.30</b>
<b>Lingvaj Respondoj</b> . . . . .	<b>2.80</b>
<b>Proverbaro Esperanta</b> . . . . .	<b>2.70</b>
<b>Andersen</b> — Fabeloj I. kaj II. parto po . . . . .	<b>4.40</b>
<b>Goethe</b> — Ifigenio en Taŭrido . . . . .	<b>3.30</b>
<b>Gogol</b> — La Revizoro . . . . .	<b>3.30</b>
<b>Heine</b> — La Rabeno de Baŝarah. La Gimnazio . . . . .	<b>2.30</b>
<b>Molière</b> — Georgo Daudin . . . . .	<b>1.75</b>
<b>Orzeszko</b> — Marta . . . . .	<b>5.50</b>
<b>Schiller</b> — La Rabistoj . . . . .	<b>3.30</b>
<b>Shakespeare</b> — Hamleto . . . . .	<b>2.75</b>

Nur antaŭpago. — Por sendkostoĵ aldono 10%.

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.